# ESPERANTO EN AFRIKO

Oficiala bulteno de la Afrika Komisiono de UEA

Numero 31 (2017: 2)

*Karaj legantoj,*

*Esperanto iom post iom plivastiĝas en Afriko, la kontinenta movado akiras sian propran identecon kaj komencas difini siajn proprajn bezonojn. Tiu ĉi nova numero de la bulteno prezentas al vi la plej freŝdatajn informojn pri Esperanto-movoj sur la kontinento.*

*Krom pri la reorganiziĝo de la Afrika Komisiono de UEA, invito por TEJO-volontula laboro en Burundo, naskiĝanta TEJO-sekcio en Tanzanio, statistikaĵoj pri la unua afrika Internacia Junulara Kongreso (IJK), instruaj agadoj en Benino, Tanzanio kaj Togolando, impresoj de partopreninto de la Internacia Junulara Festivalo (IJF) aprile 2017 en Italio kadre de la AEJK-projekto, eblas ankaŭ legi pri la movadaj ideoj kaj agadcentro de Emile Malanda Nianga – la nova kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA – tra intervjuo kun li.*

*Bonan legadon al vi!*

***La redakcio***

************

# Ekoficas la nova Afrika Komisiono de UEA

Renovigite de la Estraro de Universala Esperanto-Asocio, la nova Afrika Komisiono ekoficas la 19-an de majo 2017.

La Komisiono konsistas el unu kunordiganto, unu vickunordiganto kaj ok membroj. Ili ĉiuj estas elektitaj tiel: tri rekomenditoj de la aliĝintaj landaj asocioj de UEA, tri laŭ la rekomendo de la lastatempa diskutgrupo Afrikanoj Sub Unu Tegmento (ASUT), du homoj el la ĵus antaŭaj komisionanoj kaj du aktivulinoj.

Por la nova ofico-periodo la komisionanoj estas s-ino Adeline Tony Umutoni (Ruando), s-ro Adjévi Adjé (Togolando), s-ino Alexandrine Omba Tshamena (DR Kongo), s-ro Alfred Arthur (Ganao), s-ro Arlain Kizeyidioko (DR Kongo), S-ro Assane Faye (Senegalo), s-ro Doumegnon Koffi (Togolando), s-ro Emile Malanda (Sudafriko), s-ro François Hounsounou (Benino) kaj s-ro Hassano Ntahonsigaye (Burundo).

Mark Fettes, la prezidanto de UEA, esperas, *ke la nova Komisiono povos serioze pripensi siajn taskojn sur la diversaj agadkampoj de UEA, nome: 1) Konsciigo – produktado de taŭgaj informiloj; kunlaboro pri reprezentado en internaciaj konferencoj k.s.; 2) Kapabligo – aranĝado de kursoj kaj ekzamenoj; kunlaboro pri la AMO-seminarioj; 3) Komunumo – planado de la Afrikaj Kongresoj; interkontaktigo de esperantistoj en ĉiuj partoj de Afriko; flegado de novaj movadoj kaj landaj asocioj; 4) Kunordigo – prizorgado de la retejo de UEA pri Afriko; eldonado de la revuo "Esperanto en Afriko"; kompilado de jara raporto.*

La komisionanoj aktive interkonsiliĝas por havi komunan planon, pri kiu eblas legi en la sekvaj numeroj de la bulteno. Sendube la perspektivo de nova Esperanto-elano en Afriko ŝajnas pli kaj pli firma.

Laŭ la statuto de UEA: *Por esplori iujn problemojn, aŭ por la plenumo de difinitaj taskoj, la Komitato aŭ la Estraro povas elekti inter aŭ ekster siaj membroj reprezentanton aŭ specialan komisionon kun kontrol-povoj, sed ne rajtas transdoni al tiu siajn decidrajtojn.*

**Adjévi Adjé**

# Volontumado en Burundo

*TEJO invitas vin por fariĝi plentempa TEJO-volontulo en la E-Centro en Rumonge, Burundo. La volontulo ricevos poŝmonon kaj loĝos en la centro, kiu enhavas ĉambron kun lito, necesejo kaj elektro. En la centro estas ankaŭ du klasĉambroj, granda legejo, granda loko por stokejo de libroj kaj unu ĉambro por oficejo de la landa asocio ANEB.*

*La elektro en la centro ne estas regula, kaj ĝi ĉesas/venas sen plano. En la ejo ne estas akvokrano, sed je kelkaj metroj eblas havi akvon (trinkeblan) kontraŭ malgranda monsumo. La centro troviĝas en la kvartalo Kanyenkoko, kie estas novekonstruita moderna bazaro.*

***La taskoj de la volontulo:***

*Reprezenti kaj informi dum kongresoj kaj seminarioj,*

*Instrui Esperanton loke;*

*Administri kaj prizorgi kontaktojn kun afrikaj kaj neafrikaj strukturoj kaj organizoj;*

*Aktive subteni la agadon de la estraranoj kaj komisiitoj de TEJO;*

*Aktive kunlabori en la aktualigo de la retpaĝoj kaj la societaj kanaloj de TEJO.*

*La volontulo rajtas proponi propran projekton al la Estraro de TEJO. Se la Estraro akceptas ĝin, la volontulo faros ĝin dum ĝis 20% de sia tempo.*

***Kondiĉoj por kandidatiĝi:***

*Havi pli ol 18 jarojn, esti naskita en aŭ post 1982;*

*Havi bonan scipovon de Esperanto;*

*Havi sperton pri organizo de eventoj kaj laboro en grupo estas pluso;*

*Loĝi aŭ akcepti loĝi en Burundo dum la volontula periodo;*

*Esti sperta pri komputil-uzado (retpoŝto, interreto, tekstprilaborado ktp);*

*Havi sufiĉan konon pri la junulara E-Movado;*

*Esti kapabla memstare preni decidojn;*

*Esti preta aktive kunlabori kun la estraro de TEJO kaj kun lokaj respondeculoj rilate al la ĝenerala funkciado de la organizo;*

*Prefere ne esti civitano de Eŭropa Unio.*

*La kandidatiĝojn (vivresumon kaj motivleteron plus laŭeble pruvilojn de la supre postulataj kapabloj) oni bonvolu sendi ĝis la 30-a de junio 2017 al: kandidatigxu@tejo.org.*

# TEJO-sekcio en Tanzanio

*La ideo fondi TEJO-sekcion venis al ni antaŭ la jaro 2015, kiam ni kunvenis en la urbo Bunda por diskuti la revigligon de la nacia movado. Ni pripensis kiel gejunuloj povas kontribui al la kresko de la landa movado. La ideo estis refoje diskutita la 6-an de decembro 2016 en kunveno de gejunuloj kaj ankaŭ dum la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto en la ĉeesto de Jérémié Sabiyumva, komisiito de TEJO pri Afriko,* klarigis juna tanzania aktivulo.

La tanzania junulara sekcio fakte naskiĝis la 26-an de decembro 2016 kaj konfirmiĝis per fonda kunveno en 2017. La kunvenon parto-prenis: John E. Magese (prezidanto), Paul Katuju Kusaya (sekretario), Ester Samweli (kasisto), Magreth Samson (estraranino), Simba Mramba (estrarano) kaj la aliaj membroj: Anord Edward, Sikujua, Edina Piter, Yusuph Paul, Editha Paul, Erza Samwel, Stiven Edward, Elia Joseph, Rahel Paul, George Tyitory, Magesa Pius, John Jumanne, Mariam Gervas, Amos Batromayo.

La kunveno aprobis la statuton kaj la jenajn agadcelojn: 1) informi kaj prezenti al la tanzanianoj, specife al la gejunuloj pri Esperanto, 2) kontribui al la tutmonda E-kulturo per kontribuaĵoj de junaj tanzanianoj, 3) organizi renkontiĝojn, kursojn, prelegojn kaj aliajn programojn pri Esperanto, 4) kunigi per agadoj la junularon kaj kreskigi ĉe ili la senton de solidareco.

De post la fonda kunveno regule kunvenas sekcianoj por kune lerni la lingvon kaj vive diskuti E-agadojn. Ĝi pli kaj pli akceptas la defion kunigi agade la gejunulojn en Tanzanio.

**Paul Katuju Kusaya**



***John E. Magessa – 28 jaraĝa junulo – estas mezlerneja instruisto pri la angla kaj geografio. Ekde oktobro 2016 li instruas E-on dufoje semajne (marde kaj merkrede) ĉe la lernejo Kaigara en la distrikto Muleba.***

# Kelkaj statistikaĵoj pri la unua IJK en Afriko

Partoprenintoj de ekskurso dum TEJO-seminario oktobre 2016 en Kotonuo



La plej prestiĝa renkontiĝo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), nome la 73-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto, okazos en Anécho, Togolando, de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2017. Estos la unua fojo kiam la jar-renkontiĝo de TEJO okazos en la kontinento.

Fakte, ĉi-jare la iama deziro de junaj togolandaj aktivuloj gastigi la jar-eventon de TEJO realiĝos. Antaŭ ĉ. 10 jaroj, la togolanda junulara sekcio oficiale kaj formale kandidatiĝis pri la organizo en 2009 de la 65-a IJK, kiu fine okazis en Liberec kunlabore inter Ĉeĥio, Germanio kaj Slovakio.

Kvankam la unua afrika IJK multflanke specialas, ĝi funkcios per kutime konataj programeroj en Esperantujo: *Dum la tago okazos programo rilata al la temo de la kongreso "Virinoj kaj viroj kun siaj kulturoj", movadaj kaj distraj programeroj. Okazos krome aktivaĵoj de la projekto-AEJK (Afrik-Eŭropa Junulara Kapabligo),* komentis Łukasz Żebrowski, eks-prezidanto de TEJO. Laŭ li: *Kiel ĉiam dum la IJK okazos kunsidoj de la Komitato de TEJO kaj aliaj programeroj rilataj al la vivo de la asocio. Certe ne mankos ankaŭ distraĵoj, sportaj programeroj, manlaboroj, ekskursoj kaj diversaj kursetoj, dum kiuj spertuloj dividos siajn konojn kaj sciojn kun la partoprenantoj. Dum la vesperoj okazos kultura progamo, ekzemple, koncertoj kaj teatraĵoj. Ili ebligos konatiĝi kaj kun la kulturo de Esperantujo kaj kun loka arta tradicio.*

Malgraŭ tio ke la decido pri la okazigo de la IJK en Togolando estis tre malfrue anoncita, 85 personoj sur 4 kontinentoj el 24 landoj jam aliĝis al la renkontiĝo. Eble la nombro de la ĉi-jaraj IJK-anoj estos malpli ol 100 personoj, tamen oni esperas havi pli grandan eventon ol tiujn, kiuj okazis en 1962 en Ystad (Svedio) kaj en 2013 en Nazareto (Israelo), respektive, kun 70 kaj 90 aliĝintoj. Krome la 73-a IJK plej verŝajne ankoraŭ altiros pli da aliĝemaj landoj ol kelkaj el la jam okazintaj IJK.

*Certe estos la ŝanco, por togolandanoj aparte kaj por samkontinentanoj ĝenerale, sperti relative multnombre tiun etoson de la tutmonda junulara organizo tra ĝia jar-renkontiĝo, la IJK! Kunvenos junaj E-aktivuloj de la tuta mondo, do ne mankos programeroj per kiuj ili povos interŝanĝi spertojn, trejniĝi, prezenti sian agadon*, opiniis togolanda aktivulo, entuziasme.

La listo de la aliĝintaj landoj ĝis la 3-a de junio konsistas el: TG (11), BJ (11), SK (9), PL (8), NL (7), BI (6), DE (5), IT (5), NG (5), FR (4), ES (2), GH (1), ZM (1), KE (1), RU (1), CA (1), BE (1), SN (1), MZ (1), FI (1), TZ (1), ZA (1), NE (1), JP (1).

Eblas aliĝi al la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso (IJK) per la kongresa retpaĝo: *http://ijk2017.tejo.org/aligilo*.

**La redakcio**

# Revigliĝas la Esperanto-movado en Tanzanio

La sesa Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) estis vera reklamilo pri la internacia lingvo Esperanto en Tanzanio kaj aparte en la urbo Bunda. Dum la kongresa semajno pli ol unu loĝanto de Bunda eksciis pri la ekzistado de Esperanto kiel unike neŭtrala universala komunikilo en la mondo. Rezulte, ekde la jar-komenco 2017, ne mankis laboro por daŭre funkciigi Esperanton kaj vigligi la movadon per planado kaj okazigo de aktivaĵoj.

Kiel la motoro de la E-movado en Tanzanio, la Bunda klubo ĉiam okupiĝis pri la kontaktoj kaj korespondadoj kun la esperantistaj aktivuloj de diversaj regionoj sur la landa teritorio. Kun tiuj ĉi estis decidite firma restarigo de la surlokaj E-kluboj, kreo de grupo de tanzaniaj esperantistoj, kiuj okupiĝos pri turismo enlande, fondo de virina sekcio kaj pretigo de la statuto de la TEJO-sekcio en Tanzanio kun la provizora nomo: Tanzania Esperantista Junularo (TEJ).

La Bunda E-Rondo, kiu aktivis por la movado en la regiono, ŝanĝis la nomon kaj nun iĝis la Bunda Esperanto-Centro (BEC) kaj tial ĝi transprenis la kunlaboron kun la esperantistaj aktivuloj de aliaj regionoj. BEC celas disvastigi Esperanton en la regionoj kaj esti la agadcentro por helpi la klubojn, grupojn kaj unuopulojn en iliaj aktivaĵoj. La membriĝo en BEC estas malfermita por ĉiuj.

La ideo pri turisma grupo konkretiĝis. La grupo celas a) disvastigi Esperanton per turismo, b) bonvenigi esperantistajn kaj ne esperant-istajn turistojn el la tuta mondo kaj konigi al ili vididindaĵojn per ĉiĉeronado en Tanzanio. La grupo funkcias sub la respondeco de Barnabas



Kelkaj BEC-anoj dumkunvene



Kelkaj BEC-anoj kaj ruslanda gasto Roman en Bunda

Magese. Krom tio, ni organizis kursojn por infanoj kaj ankaŭ laboris pri virina sekcio kaj finpreparis la statuton de TEJ. La kursoj okazis en la urboj Bunda, Mwanza, Kagera kaj Muleba sub la gvido de s-roj Paul K. Kusaya kaj John Magessa.

En aprilo ni regule renkontiĝis por lerni Esperanton skribe kaj parole. Mulele Mbassa gvidis duontagan progresigan kurson en Bunda, la partoprenantoj venis el la urbo Bunda kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. La kurso estis interesa kaj sukcesa, ĝi konsistis el tri eroj: vorto-farado, uzo de akuzativo kaj konversacia rondo. La partoprenantoj ĝuis la lecionojn kaj proponis, ke denove oni aranĝu tian kurson. Speciala gasto dum la kurso estis la ruslandano Roman. Li partoprenis en nia Esperanto-renkontiĝo kaj kun ĝojo ni lernis kune kun li la lingvon Esperanto. Lia restado ege helpis nin pli vigle praktiki la lingvon.

La ĉeesto surloke de eksterlandaj e-istaj gastoj multege helpas disvastigi Esperanton. Tial ĉi ni invitas kaj bonvenigas ĉiujn samideanojn al Tanzanio kaj aparte al la urbo Bunda.

Ni esploris pri la E-movado en la landaj regionoj kaj estas rimarkite, ke kelkaj kluboj havas viglan vivon, nome Bunda Esperanto-Centro (BEC), Muleba E-klubo (MEK), Goldland E-klubo (GEK), Pacamanta E-Rondo (PEC). Krom tiuj kluboj estas aliaj E-kluboj kun malforta kluba vivo kaj BEC klopodas nun por kontribui, ke tiuj ĉi grupoj atingu evoluintan movadan nivelon.

**Mulele Mbassa**

# Instruado de Esperanto en benina elementa lernejo

La NeRegistara Organizo Scio Sen Bariloj (SSB), kiu zorgas i.a. pri la instruado de Esperanto en Benino, trovas alian oportunon por divastigi Esperanton en tiu lando.

Abomey-Calavi estas granda urbo tute najbare de Kotonuo, la ekonomia ĉefurbo de Benino, lando en okcidenta Afriko. En tiu urbo Abomey-Calavi, situas la granda benina universitato kun proksimume 100 000 gestudentoj. Tie estas tute nova kaj kuraĝa elementa lernejo *Hadegnon*. Ĝiaj fondintoj kaj gvidantoj deziris provizi siajn gelernantojn per instruado de la internacia lingvo Esperanto. Do, ili ekrilatis kun SSB.

La 15-an de februaro 2017 la prezidanto de SSB Privas Tchikpe kaj Mireille Grosjean iris viziti la lernejon kaj konatiĝi kun la gvidantoj. Diskuto okazis pri la okazigo de tia instruado. Decido estas, ke komence du klasoj ricevu instruadon de Esperanto, tio estas klasoj kun infanoj en la aĝo de dek kaj dekunu jaroj.

La 2-an de marto 2017 okazis inaŭgura kurso por la du klasoj. Ĉiuj instruistoj kaj gvidantoj ĉeestis kaj atente sekvis la prezenton de Privas Tchikpe pri baza konversacio kaj pri la literoj kaj sonoj, kaj poste la prezenton de Mireille Grosjean pri kelkaj afiksoj (bovo-bovino-bovido) por montri la strukturon de la lingvo. Okaze de tiu inaŭguro, la gvidantoj kaj Privas Tchikpe kiel prezidanto de SSB subskribis interkonsenton pri kunlaboro. Plie aperis Kingslim Edah, lerta junulo sukcesinta en la ekzameno de ILEI, tria nivelo, kiu nun prizorgas la instruadon de Esperanto en tiu lernejo.

Dum la kursoj, ĉiu lernanto partoprenas; ĉiuj volas proponi respondon al demando, eĉ se ili ne estas certaj pri la respondo, ili volas feliĉe ion proponi; ili facile divenas, ili ne timas krei kaj proponi laŭ siaj komprenoj; oni ludas lernante Esperanton... Fakte, la Esperantohoro estas ĝoja tempo por la gelernantoj. Tiuj kiuj ankoraŭ ne atingis tiun klason, rigardas nin tra fenestroj kiam ni faras parolajn ekzercojn. Tio kaptis la atenton de ĉiuj lernejanoj. Do okazis, ke ankaŭ la instruistoj de *Hadegnon* volas studi Esperanton, kaj tion Kingslim favore kaj ĝoje akceptis kun aprobo de la prezidanto de SSB.



**Kingslim Gadoufia Edah**

Ĝis nun, la instruado bone disvolviĝas. La instruisto ĉefe uzas laŭ sia kapablo instruilojn kiel kretoj kaj fotokopioj de bildoj kaj de tekstoj. La lernolibro por la instruistoj estas *Metodo 11*, sed la kurso de la gelernantoj estas bazita sur la lernolibro *L'espéranto par la Méthode Directe* de Stano Marček.

Ĉio bone okazas en *Hadegnon*, vorto el adja-gbe, unu el la lokaj lingvoj, kiu signifas, ''ni daŭrigu bonan amikecon'', laŭ la klarigo de la direktoro. Konsekvence, SSB esperas daŭrigi amikecon kun tiu lernejo danke al la instruado de Esperanto.

Krom tio, Esperanto estas instruata al tiuj, kiuj interesiĝas pri ĝia lernado en la biblioteko de la Esperanto-domo, kiu situas en Kotonuo. En la biblioteko estas kelkaj lernolibroj, lego-libroj, vortaroj kaj revuoj en Esperanto por niaj vizitantoj, kiuj ofte demandas pri tio, kion konkrete oni povas gajni pri, per aŭ tra Esperanto. Ni esperantistoj devas labori por havi facilan respondon al tiaj demandoj.

Notinde ke SSB provizas sinjoron Edah per eta kompenso por tiu laboro kaj devis provizi lin plie per motorciklo por atingi la lernejon. Via subteno al la UEA-konto de SSB *assb-k* ĉiam estas bonvena kaj efike uzata.

**Kingslim Gadoufia Edah**

# Esperanto-instruado en nova togolanda lernejo

La lernejo *Le Trophée des Elites* decidis enkonduki la instruadon de la internacia lingvo Esperanto al siaj gelernantoj, kaj tio ekde la dua trimestro de la jaro 2017. Estis la unua fojo kiam Esperanto estas instruata en la lernejo. Fakte, ĝis tiam nur la angla, la hispana estis lernataj kaj la franca kaj evea estis la bazaj instruaj lingvoj.

La fondinto kaj direktoro de la lernejo, Hunkportie Mawuena, siaflanke, diris konvinkiĝi, ke la lernado de Esperanto helpos al liaj gelernantoj larĝigi siaj horizonton: *Mi baziĝis sur la idealoj de Esperanto, ke necesas helpi la gelernantojn malfermiĝi al la kulturo de la mondo. Mi ricevis instruproponon far togolanda esperantista aktivulo, mi rimarkis la entuziasmon de la gelernantoj pri Esperanto, kaj la gepatroj aprobis la ideon. Mi komencis serioze pripensi la aferon.*

En marto 2017 okazis la unua kontakto kun la gelernantoj de ĉiuj klasoj de la elementa kaj de la unua klaso de la meza lernejoj. La lerneja direktoro prezentis min al siaj gelernantoj kaj al tiuj ĉi mi faris kelkminutan prezenton pri la internacia lingvo. Estis klarigoj en la franca lingvo pri la Esperanto-kurso kaj pri la ebloj kaj avantaĝoj de Esperanto por la internacia komunikado. La gelernantoj tre ĝojis pro la ideo kaj scivoleme levis multajn demandojn, pri kiuj ili ricevis kontentigajn respondojn.

La kursoj mem komenciĝis en aprilo en ĉiuj klasoj escepte de unu – tiu havos oficialan ekzamenon tre baldaŭ. Entute pli ol 100 gelernantoj eklernas ĉiu-marde kaj ĵaŭde E-on dum ĉ. 6 horoj sub mia gvido. La instruado okazas en bona etoso per la libro *Metodo 11*, sed mi kopias ankaŭ klarigojn kaj desegnas bildojn sur la nigra tabulo per kreto por tiel helpi al la gelernantoj bone kompreni la lecionojn.

La tuta Esperanto-instruado estas sur bona vojo. Estas espero, ke jam en la venonta lernojaro 2017-2018 la kursoj estos multe pli formalaj, tiel ke la gelernantoj povos trapasi ankaŭ ekzamenon en Esperanto same, kiel en aliaj lingvoj.

*Le Trophée des Elites* staras en la togolanda ĉefurbo en la nova periferia kvartalo Bè-kpota. Ĝi estas kiel bona oazo por la infanoj de la kvartalo, ĉar ili ne plu bezonas iri sub la suno piede kilometrojn antaŭ ol lerni skribi, legi kaj kalkuli. La lernejo estas en sia unua jaro, sed ĝi promesplenas. Tial bonvenaj estas proponoj pri interklasaj interŝanĝoj aŭ similaj projektoj kaj materialaj subtenoj por kuraĝigi la plej malriĉajn kaj samtempe la plej lertajn infanojn en la lernado de Esperanto. Eblas ankaŭ adopti nevon kaj nevinon en la lernejo. Por pli da informoj: *adjevia@gmail.com*

**Adjé Adjévi**



**Esperanto-klaso ĉe la lernejo** ***Le Trophée des Elites***

# Emile N. Malanda parolas pri sia agadcentro en Sudafriko

***Emile N. Malanda, konata nomo en Esperantujo. Kion vi povas rakonti pri via e-ista vivo?***

Jam en 1987 mi konatiĝis kun E-o. Estis miaj unuaj E-instruistoj s-roj Bernard Schneider kaj Henri Masson. Poste en la jaro 1990 eniris mian E-vivon s-ro Hans Bakker, kiu pli spronis min enmovadiĝi landskale. Do, en 1993 mi ekinstruis E-on en la universitata medio en Kinŝaso, kie kreiĝis la E-klubo EKM. Mi estis vicprezidanto de la junulara sekcio, poste kultura konsilanto kaj prezidanto de la DR konga E-asocio DKEA. Mi translokiĝis al Sudafriko kaj tie mi rapide akceptiĝis en la landa Esperantujo kiel komitatano. En Cape Town mi kreis E-klubon por instrui ĉefe la lingvon al gejunuloj kaj poste mi fondis la Interkulturan Centron pri Vivantaj Lingvoj (ICVL).

***Vigla E-vivo! Bonvolu diri kiel ICVL funkcias kaj kiom efike ĝi kontribuas al la disvastigo de Esperanto en Sudafriko.***

En pripensado kiel allogi sudafrikanojn al Esperanto venis al mi la ideo krei ICVL. *Intercultural Centre of Living Languages* anglalingve estas la oficiala nomo. Ĝi estas NeRegistara Organizo, kiu celas instrui Esperanton flanke de aliaj lingvoj al la interesiĝantoj. ICVL strukturiĝas tiel ke estas instruataj krom Esperanto, la franca kaj la angla kaj aliaj la regionaj lingvoj, nome sŭahila, afrikansa k.s. en unuopaj sesioj, helpe de miaj kunlaborantoj.

***Kiujn specialajn eblojn ofertas ICVL?***

ICVL malfermiĝas al ĉiuj personoj, kiuj emas instrui lingvojn. Kiel NRO, ICVL helpas ankaŭ la enmigrintojn loĝantajn en la urbo lerni lingvojn senpage. Tiuj ĉi krome ricevas asistan helpon por ilia integriĝo en Sudafriko. La organizo proponas ankaŭ servojn pri turismo kaj informadiko. Ni ankoraŭ zorgas pri la ekspozicio kaj vendo de afrikaj artaĵoj. Eblas pli informiĝi pri niaj aktivaĵoj per: *www.icll.co.za*.

***Kiujn problemojn vi frontas en la funkciado de la centro kaj kiel vi solvas ilin?***

La malfacilaĵoj listiĝas per manko de propra lokalo, de materialoj por enretigi la lingvajn kursojn, de adekvata subteno al la internacia instruista teamo kaj problemo de luopago por la ejo.



Emile N. Malanda

Ni okazigas la lernadon per la tradiciaj metodoj, ekz. uzante la kreton kaj tabulon. Ni ĝis nun sukcesis kovri la elspezojn per publika monkolekta kampanjo *Fund raising* kaj per la kotizoj de la kursanoj.

***En UEA pli kaj pli serioze leviĝas la temo pri UK en Afriko. Ĉu vi opinias, ke Sudafriko estus ideala lando por gastigi la unuan UK en Afriko?***

Nu, Sudafriko havas taŭgajn kondiĉojn kaj infrastrukturojn por organizi internacian eventon kiel la UK. La okazigo de la monda futbala pokalo 2010 en Sudafriko atestas pri tio. Sed kompreneble nun temas pri la UK, kiu unuavice interesas nin e-istojn. En la lando estas bone organizita landa asocio kun diversaj kompetentuloj. Nur la kunlaborado – se ĝi ekzistas inter Sudafriko kaj aliaj afrikaj landoj – ankoraŭ ne ŝajnas videbla kaj oni ja bezonos pli da fortoj por aranĝi UK.

***Kerna parto de la E-movado konsistas el landaj asocioj, kaj en la kontinento la vivo de multaj asocioj ŝajnas ne tre alloga ĉar ili dormas. Kiel plej bone funkciigi la asociojn?***

Estas fakto, ke pli ol unu asocio nun agade lamas. Ni devas demandi nin, kial? La landaj asocioj dependas de kluboj kaj la kluboj de individuoj. La grava bazo estas kluboj. Organizi la E-movadon per la bazo estas deviga kaj urĝa neceso. Funkciigi la E-komunumon per la instruado kaj organizo de individuoj en kluboj en la unuopaj afrikaj landoj ricevu nian fokusan atenton. Aliflanke, afrikaj e-istoj devas komenci kotizi kaj per tio helpi la landajn asociojn al memfinancado. Por realigi tiun celon ni devas lerni pli amikiĝi kaj ne interkonfliktiĝi.

**Intervjuis La redakcio**

# Cyprien Guiya: mi partoprenis en la IJF en Italio

Mi estis en Italio de la 7-a ĝis la 18-a de aprilo 2017, por partopreni en lertigadoj por fariĝi trejnisto. Mi alvenis ĉe la flughaveno Fumicio je la 17-a horo, tie homoj iris rapide, neniu havis tempon por aliaj, ĉiuj kontrole rigardis la alkroĉitajn ekranojn en la halo. Jam estis malvarme por mi, ni iris kune kun Cédric per trajno al Romo. Tie ni ne dormis, ni promenadis la tutan nokton por spekti la belecon de tiu malvarmega kaj moviĝa Romo.

Posttagmeze de la sekva tago ni jam estis en la festivalejo per trajno. Sen perdi tempon oni ekigis la trejnadon, kiu estis gvidita de Krina, mia malnova amikino, kaj aliaj gvidantoj, kiujn mi antaŭe ne konis. Ni senlace tagon post tago lernis metode. La trejnado estis ege interesa, ĝi estis vere utila, ne nur por Esperanto-agadoj sed ankaŭ por multaj aliaj aferoj. Ĝi estis bone aranĝita de gejunaj sed spertaj gvidantoj, kiujn mi ege dankas pro la divido kun ni. Ili ĉiuj estis simplaj, afablaj kaj malfermitaj personoj kaj mi ege aprezis ilin. Ĉe la fino de la trejnado mi kun Sabi laboris plurajn horojn teame kaj prezentis la temon: *Kiel instrui lingvojn*.

Mi povas diri ankaŭ ke ni havis la okazon partopreni en la Internacia Junulara Festivalo (IJF), kiu estis granda kaj bela festo. Ĝi kunigis diversnacianojn, eĉ azianoj partoprenis en ĝi. Tiu festivalo estis bone organizita kaj ĉio estis en ordo dum la festo, la programo estis respektita akurate, kio agrable mirigis min kaj pro kio mi gratulas la organizantojn! La renkontiĝo estis granda okazo por mi interŝanĝi kun multaj personoj pri kulturoj kaj vivmanieroj el diversaj landoj!



**Kelkaj el la partoprenintoj de la IJF 2017 en Italio**

Mi spertis ke eŭropanoj ne konas amikon, kiam temas pri tempo. Mi diras tion ĉar mi memoras, ke ni maltrafis iun ekskurson pro la fakto ke ni tiam venis malfrue!

**Dum la Internacia Junulara Festivalo en Castione della Presolana, Italio, okazis trejnadoj de TEJO pri diversaj temoj:* Tempo-mastrumado, Genra egaleco, Varbado per sociaj retoj, Motivado, Internacia Komunikado, Problemsolvado, Organizado de eventoj, Instruista trejnado.

*La trejnadoj estis la unuaj liveraĵoj de tiuj kiuj sekvis trejnadon por trejnistoj kadre de AEJK – Afrika-Eŭropa Junulara Kapabligo, subtenita de Erasmus+.*

*La organizanto de la Internacia Junulara Festivalo estis la Itala Esperantista Junularo.*

** El la retpaĝo: http://tejo.org*

*Esperanto en Afriko* estas trimonata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA pri la Esperanto-movado en Afriko.

**Redaktas:** Adjévi Adjé, 06 B.P. 61807, Lomé, Togolando; tel.: +228 902 57 549, 995 72 623.

Kion faras via landa asocio aŭ via loka E-klubo en via loĝloko? Bonvolu verki kaj sendi artikolon pri tio. La redakcio akceptas ankaŭ fotojn. Bonvenaj kompreneble estas ankaŭ sugestoj, konsiloj, komentoj por la plibonigo de la bulteno al: *adjevia@gmail.com*

**Limdato por la numero 32: la 15-a de aŭgusto 2017**

**Membroj de la Afrika Komisiono de UEA:**

**Kunordiganto:** S-ro Emile N. Malanda, **Sudafriko**
**Vickunordiganto:** S-ro François Hounsounou, **Benino**
S-ino Adeline Tony Umutoni, **Ruando**
S-ro Adjévi Adjé, **Togolando**
S-ino Alexandrine Omba Tshamena, **DR Kongo**
S-ro Assane Faye, **Senegalo**
S-ro Alfred Arthur, **Ganao**
S-ro Arlain Kizeyidioko, **DR Kongolando**
S-ro Doumegnon Koffi, **Togolando**
S-ro Hassano Ntahonsigaye, **Burundo**

Pli da informoj pri la afrika movado haveblas per: ***www.esperanto-afriko.org***